

SVISA ESPERANTO - SOCIETO

INFORMAS

4/92

Koresp-adr: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich

Red-Telefono: 01/381 77 13

Julio-Aŭgusto

DIE NEUE POPMUSIK IN ESPERANTO

LA NOVA POPMUZIKO EN ESPERANTO

11 Titel
in Esperanto
gesungen
kantitaj en Esperanto

1 Titel
instrumental
(Guitarano)

ESPERANTO



LA NOVA POPMUZIKO EN ESPERANTO

PREZO:

19,80 DM LA MC

29,80 DM LA CD

LA NOVA POPMUZIKO EN ESPERANTO

DIE NEUE POPMUSIK IN ESPERANTO

DIE NEUE POPMUSIK IN ESPERANTO
LA NOVA POPMUZIKO EN ESPERANTO

DIE NEUE POPMUSIK IN ESPERANTO
LA NOVA POPMUZIKO EN ESPERANTO

POP-MUZIKO EN ESPERANTO - MUZIKO TUTMONDA

Karaj gesamideanoj,

Post plurmonata plej intensiva laboro ni estas pretaj oferti al vi Produkton, kiu estas unika en sia speco.

Jam delonge mankas en la internacia lingvo Esperanto aktuala, laŭtempa muziko, ŝatata kaj akceptata ankaŭ de la juna generacio.

Mi starigis al mi la taskon forigi tiun mal-konvenaĵon. Tiucele mi kreis, kune kun la famkonata sudgermana komponisto kaj kolego Rainer Conrad, la MC respektive CD "ESPERANTO".

Diversaj stildirektoj de enmemoriga, sentoplene tekstita muziko kaj transigita al la internacia lingvo igas tiun-ĉi rimarkindan projekton afero, kiu plaĉas ne nur al Esperantistoj. La kasedo estas plenplena ĝuo ankaŭ por ne-esperantoparolantoj, kio koncernas plejparte aŭskultantojn de angla- aŭ franclingva muziko.
de Gunter Koch, tradukis FL.

LA DISKOJ ESTAS MENDEBLAJ ĈE:

Deutscher Esperanto-
Bücherdienst
Am Stadtpfad 11
W-6236 Eschborn/Taunus

Baden-Württembergischer
Esperanto-Bücherdienst
Zum Kräutle 8
W-7480 Sigmaringen-Jungnau

Hiermit bestelle ich ___ Esperanto-Musikkassetten zum Preis von a 19,80 DM,
bzw. ___ Esperanto-CD's zum Preis von a 29,80 DM, zuzüglich Versandkosten

Datum: _____ Unterschrift: _____

aŭ baldaŭ ankaŭ ĉe la
KULTURA CENTRO ESPERANTISTA POŜTFAKO 779
2301 LA CHAUX-DE-FONDS

* * *

GRUPAJ INFORMOJ

ESPERANTO-SOCIETO BASEL:

23.7.18.00h MONATA KUNVENO: Invito al krad-
rostado ĉe gesinjoroj Senn, Para-
dieshofstr.164. Aliĝo petata ĝis
20.7.1992.

ESPERANTO-SOCIETO BERN:

En restoracio AL FORNO Spitalgasse 37
7.7.19.30h kaj 4.8.19.30h

LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:

1.7.14.00-16.00h en restoracio BIG BEN
paroliga kunveno. Franz Brügger.

ESPERANTOKLUBO WIL:

1.7. Kantvespero ĉe Familio Chaves-Walder,
Ruhbergstrasse 11 Flawil. Gvidos Verena
Walder-Chaves.
En aŭgusto ne okazos kunveno.

ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:

13.7. kaj 10.8. LIBERAJ KUNVENOJ laŭ aparta
programo. Informo ĉe la prezidanto.

* * *

ESPERANTISTAJ POLITIKISTOJ

"En la urba konsilantaro de Bellinzona, ĉefurbo
de Tiĉino, troviĝas du esperantistoj, kiuj ĵus
promesis fidelon al la leĝoj la 12-an de majo,
okaze de la unua kunveno de la nova posteakta
urba konsilantaro.

Temas pri sinjoroj Edo Tognini kaj Tazio Carle-
varo, ambaŭ longjaraj esperantistoj, bone kona-
taj en sia regiono."

Ni tutkore gratulas kaj deziras al vi ambaŭ bo-
nan sukceson.

* * *

-Redakcio "SI"-

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA:

Okazos ĉe KCE sesio de ekzamenoj lingvaj laŭ
ILEI/UEA [Internacia Ligo de Esperantistaj In-
struistoj]. Tiel Svisoj povos ekzameniĝi surloke.
Temas pri elementa kaj meza niveloj. La datoj
estas: 15-a, 16-a kaj 17-a de aŭgusto 1992. In-
formiĝu kaj aliĝu ĉe KCE Pf 779 2301 La Chaux-
de-Fonds, telefono:039/26 74 07. -MG-

* * *

LA FEDERACIA PREZIDANTO APREZIS ESPERANTO-LABORON

Federacian merito-krucon por pastro Adolf Burkhardt pro klopodo por la ekumeno kaj la popola interkompreniĝo pere de Esperanto.

En komisio de la federacia prezidanto Richard von Weizsäcker la landa konsilanto de la Regiono Esslingen, d-ro Braun, transdonis la 19-an de marto 1992 al pastoro Adolf Burkhardt el Weilheim/Teck la FEDERACIAN MERITO-KRUCON JE RUBANDO.

Per tio Pastro Burkhardt estis distingita pro pli ol 30-jara honorofica agado en ekleziaj kaj kulturaj Esperanto-rondoj. Li tradukis ekleziajn kantojn kaj religiajn librojn, estis longjara prezidanto de la Kristana Esperantista Ligo Internacia/KELI kaj engaĝis por la ekumeno kaj la interkompreniĝo de la popoloj. Tamen, lia vivoverko estas la germana Esperanto-biblioteko, kiun Pastro Burkhardt, en 25-jara honorofica agado, kompletigis al multvalora kolekto kun pli ol 10'000 librotitoloj, kiel akcentis la landa konsilanto d-ro Braun, okaze de la transdono de la federacia merito-kruco. -el EID tradukis FL-

Kara Adolf, la redaktoro de "SVISA ESPERANTO-SOCIETO INFORMAS" tutkore gratulas al vi pro la altvalora distingo. -FL-

* * *

ESPERANTO-MUZEO VIENO

1.8.15.00-18.00h kaj 2.8.10.00-12.30h okazos prelego de Mag. Herbert Mayer pri:
"LA NASKIĜO DE LINGVO KAJ LITERATURO"

"LA UNUAJ JAROJ DE ESPERANTO"

Estas fascine, kiel povas estiĝi vivanta lingvo el projekto kun nur 16 reguloj.

Partopreno estas senpaga, sed antaŭanonco en la muzeo nepre necesas pro limigo de partoprenantoj. El: "Komunikoj el la muzeo", trad -FL-

* * *

"ESPERANTO-MONO":(Gauweiler sub Forta kritiko)

Depost la momento kiam la bavara ministro por protekto de la naturmedio, Peter Gauweiler, turnis sin decide kontraŭ la enkonduko de, kiel li esprimis sin, Esperanto-mono en Eŭropo, li falis sub multe da kritiko. La germana Esperanto-Federacio atentigas nun, ke la difino "Esperanto-mono" por la estonta Eŭro-valuto neniel estas tiel trafa, kiel ŝajnis en la unua momento. La "ECU" anstataŭigu la naciajn valutojn; sed la internacia lingvo Esperanto volas, kiel neŭtrala dua lingvo por ĉiuj, nur faciligi la interkompreniĝon transliman. Esperanto protektas la naciajn lingvojn, Esperanto ne estas lingvo-ECU, akcentas la prezidanto de la germana Esperanto-Federacio D-ro Wolfgang Schwanzer. Krom tio estas dubinde, ke Gauweiler ŝatus veki negativan asociadon per la utiligo de la nocio Esperanto. La internacia lingvo Esperanto evoluis en la daŭro de pli ol cent jaroj al vivanta kulturlingvo. Kvankam ambaŭ paŝoj - la enkonduko de Eŭro-valuto, kiel ankaŭ la enkonduko de Esperanto - (kiu estus facile lernebla dua lingvo por Eŭropanoj), krom decidigaj avantaĝoj eble estigus ankaŭ kelkajn malavantaĝojn oni tial ne rajtas tuj neniigi tiujn-ĉi bonajn ideojn, ĉar tro da perfektismaj postuloj estus malhelpaj por la Eŭropa unuigo. -el EID tradukis FL-

* * *

GRAVA ALVOKO

UK VIENO - UNUAFOJE INTERNACIA ORKESTRO

Ni ŝatas ludi Mozartsimfonion dum la UK en Vieno kaj serĉas ankoraŭ orkestranojn; ĉefe violonojn, aldojn kaj violonĉelojn, krome traversflutojn, hobojojn, klarinetojn kaj fagotojn.

Skribu al: Internacia orkestro
Thomas Kleemann Bahnhofstrasse 95
D/W-6904 Eppelheim

* * *



Lucien ĥatas memori-
gi sin pri sia bela
ekskurso monda per
biciklo. 20'000 km,
dum kiuj li senlace
klopodis bone paro-
li Esperanton.

20'000 kilometrojn per biciklo por esperanto

Temas pri Lucien Péraire [Franco], nun okdek-
sesjara, kiu faris, en siaj junaj jaroj, bi-
ciklan vojaĝon preskaŭ nekredoblan. Dum kvar
jaroj li biciklis 20'000 kilometrojn.

En la jaro 1926 Lucien lernis Esperanton. Li
same pensis kiel la aŭtoro de Esperanto, d-ro
Zamenhof, ke finfine la homoj interkompreniĝos
kaj entreprenos reciprokajn vizitojn.

En la jaro 1928 li startis al sia pilgrima bi-
ciklado por ekkoni la lingvon de la espero.
Lia vojaĝo kondukis lin tra la iama Sovetunio,
tra Siberio al Vladivostoko - Japanio - Ĉinio-
ĝis Indonezio. Neniam malkuraĝigite pro gran-
daj obstakloj. De Kazan ĝis Vladivostoko la
rusa revolucio estis detruinta la trafikvojojn.
Tial necesis adapti la biciklon al la relvojo
de la Transsiberia Fervojo, por uzi ĝin kiel
drezino. Li ĉehavis ankaŭ masteton kaj velon,
per kiuj li povis, ne pedalante, veturi helpe
de la okcidenta vento. En ĉiu urbo, en ĉiu
stacidomo oni aplaudis la biciklanton de la
relvojo.

Ĉiufoje Lucien eluzis la okazojn por disdoni
prospektojn kaj konvinki siajn admirantojn pri
Esperanto. Lia aventuro finiĝis en la jaro 1932
en Javo. La biciklo de Lucien estas nun kon-
servata en Siberia muzeo.

Malnova fotobildo, sur kiu oni vidas la junan
Lucien, ĉirkaŭita de Esperanto-amikoj indone-
ziaj, pravas pri la estinteco. En tirkesto de

ilia asocio dormas la memoroj manskribitaj de Lucien, la pasia biciklisto.

Ĉu Lucien havos iun tagon la feliĉon vidi siajn memorojn publikigitaj ?

Franclingva artikolo aperinta en franca gazeto.

-Trad. FL-

* * *

PASPORTA SERVO

LA LISTO DE
GASTIGANTOJ DE
TEJO

1992



KIO ESTAS PASPORTA SERVO?

Pasporta servo estas servo de la Esperanto-movado por la Esperantoparolantoj. Ĝiaj membroj havas la eblecon ricevi senpagan gastadon. Ĉiu, kiu posedas ekzempleron de la listo de gastigantoj, estas membro kaj rajtas uzi sian liston por trovi gastiĝon.

La listo estas persona. Oni ne rajtas prunti sian liston al alia persono. Por ke la listo validu, ĝi devas havi la nomon de la posedanto sur la kovrilo.


Gastigado pere de pasporta servo ne nepre estas luksa. Ĉiuj variantoj ekzistas, de surplanka dormado en propra dormsako ĝis rajto je utiligado de tuta domo.

Kaj ne forgesu: Pasporta servo estas servo por Esperantoparolantoj, do ĝiaj membroj devas scii Esperanton.

KIEL FARIĜI MEMBRO DE PASPORTA SERVO?

Ekzistas du manieroj membriĝi:

1. Oni aĉetas la liston de gastigantoj kaj skribas sian nomon sur la kovrilon. Ĉiujare nova listo estas eldonata; ĉiu listo validas ĝis la sekva eldono.
2. Oni fariĝas gastiganto. Ĉiu, kiu mem aperas en la listo kiel gastiganto, senpage ricevas ekzempleron de la listo kaj tiel fariĝas membro. Gastiganto devas ĉiu-jare konfirmi ke li volas resti en la listo.



* * *

** Redaktfino de "SES INFORMAS" 5/92 estas la
** 15-a de aŭgusto 1992.